

De la Federación Española de Esperanto

REVISTA

AÑO 41 N° 291 JULIO - AGOSTO 1989



**BOLETIN DE LA
FEDERACION ESPAÑOLA DE
ESPERANTO**

REDACTOR JEFE

Antonio Marco Botella
Avda. Compromiso de Caspe, 26 - 1ª
50002 - SEVILLA

ENHAVO

La kovrilo: 49a Hispana Kongreso de
Esperanto en Bilbao

	Pago
La nova estraro salutas	3
UEA-Kotizoj	5
La Jubilea Jaro	6
Esperanto kaj la laboristaro	12
La plago de paronimos	14
Piloloj (3)	17
Olimpiaj ludoj	19
Pensoj de Zamenhof	21

UTILAJ ADRESOJ

Oficejo:
Hispana Esperanto-Federacio
Rodríguez San Pedro, 13, 3º P-7
28015 MADRID

PREZIDANTO. Antonio Alonso Núñez
Apartado, 714
15780 SANTIAGO DE COMPOSTELA

VICPREZIDANTO. Alberto Franco

AGANTA SEKRETARIO. M. López
Hernández

Poŝtkesto 369
41080 SEVILLA

AGANTA VICSEKRETARIO:
Luis Gilperez Fraile

Pagoj
Poŝtkonto nº 14.011.966
Avda. República Argentina, 29
SEVILLA

JUNULARA SEKCIO (H.E.J.S.)
Jordi Ferré
Apartado 23484
E-08028 - BARCELONO

FERVOJISTA SEKCIO (H.E.F.A.)
Ronda S. Antonio 46-50, 2º 4º
08001 BARCELONA

TURISMA SEKCIO KAJ ELDONA FAKO
kaj "FUNDACION ESPERANTO"
Inés Gastón
Pº de la Constitución 35, 4º
5001 ZARAGOZA

LIBRO-SERVO
Luis Hernández García
Apartado 119
47080 VALLADOLID
Pagojn por LIBRO-SERVO.
Cuenta Postal 3 118.078 VALLADOLID

ĈEFDELEGITO DE U.E.A. EN HISPANUJO
Juan Azcuenaga Vierna
Gral. Dávila 127, portal 7, 2º izda.
Tel. (942) 33 94 87
Cuenta Postal 03548531
39007 SANTANDER

LA NOVA ESTRARO SALUTAS KAJ SIN PREZENTAS

Tre estimataj geamikoj: Vi ĉiuj scias, ke en Bilbao okazis elekto de nova HEF-estraro. Nu, la novaj estraranoj havas la honoron sin prezenti antaŭ vi kun elkora saluto kaj skizo pri pluraj eroj el sia agadplano:

Antono Alonso Núñez estis elektita prezidanto: Alberto Franco Ramírez, vicprezidanto; Manuel López Hernández, aganta sekretario; Luis Gilpérez Fraile, vicsekretario. La kasista posteno vakas. Antono Marco Botella iĝis nova ĉef-redaktoro de "Boletín", kaj pluraj aliaj personoj konsentis pri diversaj kunlaboraj taskoj (pri kio ni informos vin oportune).

Ni jam antaŭdankas vin ĉiujn por la helpado, kiun vi sendube bonvolos malavare doni al ni por la plej bona sukceso de nia agado por ĉies komuna celo.

En sinsekvaj numeroj de "Boletín" ni informos vin kiel eble plej komplete pri malvolvo de la agadplano skizita kaj aprobita en Bilbao. Jen nun —nur telegrame— kelkaj komencaj aferoj:

La estraro decidis, ke la sidejo de la Federacio troviĝu en la madrida Centra Oficejo; fakte, en ĝi okazis la unua estrarkunsido, la 16an de septembro. Kaj ni kaptas la okazon por publike kaj oficiale danki la klarvidajn kaj malavarajn samideanojn, kiuj post multjaraj laboroj kaj oferoj sukcesis havigi al la Federacio tiun taŭgan, propran ejon.

Same oficiale kaj publike, ni dankas la laboron de la antaŭa estraro, kaj tute speciale tiun de nia ĝisnuna prezidanto, s-ro Salvador Aragay Galbany, kiu daŭre estis la motoro de la tuta HEF-agado.

Vi ĉiuj bone scias, ke la financoj konsistigas la malfortan flankon de HEF. Tiuj anoj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 1989, ricevos ĉi tiun numeron renburse, ĉar HEF bezonas tiun monon por pagi diversajn fakturojn.

Niaj anoj baldaŭ ricevos enketilon, por ebligi la eldonon de nova, ĝisdatigita adresaro, kaj ebligi ankaŭ tion, ke la estraro povu trastudi ĝin, kaj vidi tiun, kiu povas kaj pretas fari ion por kunlabori en mia komuna celo.

Imite de tio, kio jam okazis en pluraj landoj, ni baldaŭ dissendos al ĉiuj anoj plurajn varbilojn por t.n. "apogantoj" aŭ "simpatiantoj"; t.e., homoj kiuj, kvankam mem ne-esperantistoj, principe aprobas nian celon kaj agadon, kaj helpas nin per malalta kotizo (unu sola malalta pago por pluraj jaroj). Se ni sukcesos en tia varbado, niaj financoj iomete pliboniĝos, kaj ni havos pli grandan forton antaŭ aŭtoritatoj kaj institucioj. Krome, la estraro proponas, ke ĉiu HEF-ano iĝu reprezentanto de la Federacio antaŭ tiuj personoj, kiujn li varbis (ĉefe, por informado pri evoluo de nia agado, por kio siavice la estraro provizos rimedojn).

En rilato al la ĵusa alineo, ni diru, ke la estraro esperas, ke ĉiu HEF-ano iĝos aktivulo favore al la Federacio. Ni pensas, ke tia reprezenta rolo estu la minimumo postulenda al aktivuloj.

Pri kongresoj: Vi jam scias ke en 1990 nia kongreso okazos en Sant Cugat del Vallès; en 1991, tre probable en Santiago de Compostela; en 1992, en Mérida; kaj en 1993, la Universala Kongreso en Valencio. La estraro salutas tie ĉi kaj dankas la agadon de ĉiuj kvar Lokaj Kongresaj Komitatoj; baldaŭ ĝi rekte korespondos kun ili. La estraro plian fojon atentigas ĉiujn anojn pri la graveco kaj komplikeco organiza, financa, ktp. de la UK en Valencio; ĝi esperas ke ni ĉiuj senescepte kontribuu jam nun per niaj laŭeblaj oferoj al la laborego de la valencia LKK. Dankon ankaŭ al la LKK de Bilbao.

Ni jam studas, ĉu nia Statuto bezonas aŭ ne bezonas reformon por ke ĝi plene taŭgu por la nova socio kaj cirkonstancoj en kiuj ni vivas (pensu, ekzemple, pri la nova strukturo de la hispana ŝtato. ktp).

Per la enketilo antaŭe citita la estraro esploras ankaŭ, ĉu inter ni montriĝos vivipova tia aranĝo nomata i.a. "Libro-Klubo", "Libro-Rondo", k.s., per kiu la klubanoj abonas periodan ricevon de E-libroj (ni diru, kvar aŭ ses en la jaro). Sukceso de tia aranĝo kunportus almenaŭ jenajn tri avantaĝojn: Niaj anoj pliriĉiĝus kulture kaj ankaŭ en siaj E-konoj; oni grade stimulus kaj ebligus eldonadon de novaj libroj, diskoj, ks.; oni helpus la financojn de HEF sen plialtigo de kotizoj.

Mult-multaj aliaj aferoj restas traktendaj. Sed en la malgranda loko disponebla ni skizu almenaŭ pri la afero sendube plej grava por ni ĉiuj en la nunaj tempo kaj cirkonstancoj: La estraro devas sukcesi, ke impeta ondo de kunlaboremo traskuu nian tutan agadon: HEF, HEJS, ILEI, HALE, HEFA, "Fundación Esperanto", "Fundación Fernando Soler", ktp; ĉiuj grupoj kaj federacioj lokaj, regionaj, aŭtonomaj, ĉiu unuopolo, devas sukcesi, per adekvataj strebadoj kaj dozoj da bona volo, veni al intima, amika, ĝoja kunlaborado.

La estraro sin turnas al ĉiuj koncernatoj por veni al tia kunlabora celo. Kaj tute speciale ĝi sin turnas al la junularo: Sen la junaj homoj HEF povos fari preskaŭ nenion; kun ili, ĝi povas almenaŭ kurage alfronti kion ajn. Kaj por instigi ilin al tia sintenado, ni memoru tie ĉi, ke Hector Hodler estis 21-jara kiam li sukcesis firme starigi nian Universalan E-Asocion kaj la revuon "Esperanto"; kaj li sukcesis, en batalo kontraŭ ĉiuj disigaj fortoj, tiel de junaj kiel de maljunaj homoj.

Antonio Alonso

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 1989 KAJ 1990

Por la jaro 1990 la kotizoj por UNIVERSALA ESPERANTO—ASOCIO restas senŝanĝaj. Notu ke la revuo Esperanto estos aŭtomate dissendata al abonantoj de 1989 ankaŭ dum januaro kaj februaro.

La esperanta komunumo certe bezonas ĉian subtenon, ankaŭ rilate financojn. Tial ni petas vian daŭran apogon kaj reabonon.

Jen, la plej gravaj kotizeblecoj:

Membro kun Gvidlibro	550 p-toj
Membro kun Jarlibro	1.380 p-toj *
Membro Abonanto	3.450 p-toj *
Abono por revuo "Esperanto" sen membreco	2.070 p-toj
Abono por revuo "Kontakto"	1.040 p-toj
Kotizo por Societo Zamenhof	6.900 p-toj
Abono por 10 numeroj al "UN kaj NI"	690 p-toj
Abono por 10 numeroj al "Esperanto-dokumentoj"	1.725 p-toj
Abono por magazino "Monato"	2.950 p-toj
Praktika poŝkalendaro LA JARO 1989 (160 p.)	370 p-toj
Abono por kultura revuo "Literatura Foiro"	3.100 p-toj

* Junuloj, malpli ol 30 jaraĵ, sen plia pago ricevas la revuon Kontakto. NEPRE bezonatas naskiĝdaton.

Notu ke por 1990 estas jenaj gravaj modifoj:

Membriĝo kiel MG ne rajtigas al rabato de kongresa kotizo. Por la kongresa kotizotabelo, MG do ne estas individua membro.

Alia grava ŝanĝo estas la altigo de la aĝlimo por TEJO al ĝis inkluzive 29, anstataŭ 25 jaroj. Tio rilatas al MJ—K kaj MA—K, kaj ankaŭ DM ricevos la revuon **Kontakto** ĝis la aĝo de 29 jaroj. Tiu ŝanĝo validas jam por 1990. Por administri tion ni uzas la aĝon je la 1a de januaro, tiel ke membro ankoraŭ ne 30-jara je la 1a de januaro restas en kategorio MJ—K, MA—K aŭ DM—K.

Estas implicoj rilate al la aĝlima decido kaj la kongresa kotizo. La aĝlima ŝanĝo ne influas la kotizojn por Havano, t.e. al la 75a UK senpage rajtas aliĝi partoprenantoj de la 46 IJK en Kubo, kiuj ne estas 26-jaraĵ je la 1a de januaro 1990. La nova difino de junulo (ĝis inkluzive 29) validos por la kongresaj kotizoj nur ekde Bergen en 1991.

LA JUBILEA JARO EN HISPANUJO

Ses hispanoj estis membroj de la Internacia Patrona Komitato starigita de Universala Esperanto-Asocio: L. M. Juan Carlos de Borbón, reĝo de Hispanujo, la unua ĉef-ŝtatestro apoganta la Jubileon; S-ro Marcelino Oreja Aguirre, ĝenerala sekretario de la Eŭropa Konsilantaro; S-ro Enrique de la Mata Gorostizaga, prezidanto de la Internacia Ruĝa Kruco; S-ro Pedro Laín Entralgo, direktoro de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo; S-ro Amador Schüller, rektoro de la Madrida Universitato "Complutense"; kaj S-ino Montserrat Caballé, mondkonata oper-kantistino.

En la Honora Komitato de la 47-a Nacia Kongreso de Esperanto membris Felipe González Márquez, ĉef-ministro; Félix Pons Irazabal, prezidanto de la Parlamento; Carlos Solchaga Catalán, ministro pri Ekonomio kaj Financoj; Javier Solana Madariaga, ministro pri Kulturo; Joaquín Leguina, prezidanto de la aŭtonoma Madrida Komunumo; Juan Barranco Gallardo, urbestro de Madrido; Camilo José Cela, membro de la Akademio de la Hispana Lingvo kaj mondkonata verkisto; Angel Nieto Roldan, monda ĉampiono pri motor-ciklado kaj aliaj eminentuloj. La Honoran Patronecon akceptis la reĝo Juan Carlos la 1a.

Sendube tiu ĉi Nacia Kongreso estis la plej brila esperanta aranĝo de la Jubileo kaj okazis en la ŝtata ĉefurbo, Madrido, de la 16a ĝis la 20a de aprilo. Dum tiuj tagoj la junulara sekcio malvolvis apartan programon kadre de ĝia 11a Renkontiĝo. La estraro de Universala Esperanto-Asocio pro nebla partopreno de ĝia prezidanto d-ro Humphrey Tonkin reprezentigis per sia ĝenerala direktoro, s-ro Simo Milojeviĉ, kiu legis leteron de d-ro Tonkin kaj ankaŭ fest-prelegis. Alia interesa prelego estis tiu de S-ro William Auld pri "Cent jaroj da vivo kaj espero". El tiu kongreso menciindas la omaĝo al fratinoj Gastón, veteranaj aktivaj esperantistoj; la Artaj kaj Sciencaj Horoj, gvidataj de s-ro Antonio Alonso Núñez; la prezentado de novaj verkoj, ĉar la eldona aktivado aparte vigligis dum tiu ĉi jaro, kaj la teatrajn prezentojn fare de la Bulgara Esperanto-Teatro, kiu ege brile ludis "Pikniko sur la batalkampo", de Fernando Arrabal, kaj "La groto de Salamanka", de Miguel de Cervantes.

La junularo havas nun jenajn sekciojn; Junaj Verkistoj, kies unua eldonaĵo prezentigis: Pandemonio; Scienca Aplikado kaj Komputer-amantoj por Esperanto. Decidiĝis aperigo de du revuoj: "HEJS-Juneco" por priesperantaj temoj, kaj "La Mano" por kulturo kaj distro; eldonado de broŝuroj en baska, galega kaj kataluna lingvoj; starigi Instruan Komisionon; okazigo de la 12a renkontiĝo en Monistrol de Montserrat (Barcelona), venontjare.

En la Belartaj Konkursoj de UEA atingis la unuan premion en la branĉo "prozo", kun "Laura", hispano kiu sin kaŝas sub la plumnomo Liven Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz).

La patronaro de "Fundación ESPERANTO" organizis Internacian Literaturan Konkurson.

Omaĝe al forpasinta s-ano Luis Mimó Espinalt estis starigita "Fondaĵo Luiso Mimó Espinalt" kun la celo eldoni verkojn kiujn li tradukis en Esperanton. Kvankam en la 47a Hispana Kongreso la komisiono decidis unue presigi Kataluna Don Kifoto, tamen ĝi ne efektiviĝis antaŭ jarfino.

La manko de fortaj financaj por-esperantaj organizoj estis unu el la kaŭzoj de malsukceso en la klopodoj por eldoni en la jubilea jaro hispanlingvan biografion de d-ro Zamenhof, verkitan de d-ro Fernando de la Puente Solsona (ĝia titolo: "El Doctor Esperanto: L. L. Zamenhof, apóstol de la paz"), kvankam la Aragona ŝparkaso pretis aĉeti 150 ekzemplerojn.

En Ĝirona oni organizis en septembro Esperantistan Semajnon, kies plej grava aranĝo okazis la 24an, per paroladoj kaj prezentado de novaj verkoj.

La 23a Kataluna Kongreso de Esperanto okazis en Barcelona, de la 9a ĝis la 12a de oktobro. Menciindas la diskonigo de la ĉi jaraj premioj de la Internaciaj Floraj Ludoj. S-ro Timothy Brian atingis la Naturan Floron kaj Eglanterion per "Simfonio verda", la rozon per "La orhara junulino kaj la violon per "Teologio"; s-ro Julius Balbin, per "Neŭtraleco" atingis honoran mencion. Kelkaj pliaj premioj restis ne aljuĝitaj.

La 5a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazis en Torrox (Málaga) de la 11a ĝis la 13a de oktobro. Inter la programeroj estis rimarkindaj la projekcioj de filmoj pri Ekologio kaj Eŭropa Komunaĵo kaj la prelegoj pri Esperanta Prononco, Andaluziaj Dialektoj kaj Esperantistaj ŝtatoj. Dum tiu kongreso oni nomis oficiale "Avenuo Esperanto" unu el la stratoj de la vilaĝo.

La Zamenhof-tago alportis por la hispana esperantistaro plian datrevenon, la kvardekan de la oficialigo de Hispana Esperanto-Federacio. Plia strato sub nomo Esperanto inaŭguriĝis en tiu tago, en Vigo (Pontevedra), kaj estis la unua tiel nomata en la galega regiono.

Diversaj fakaj organizoj funkcias en Hispanujo. Ni menciuj la Junularan, la Fervojistan kaj la Turisman. Post la SAT-kongreso okazinta en nia lando en 1986, oni decidis starigi komisionon por oficialigi enlandan Laboristan Esperantan organizaĵon kaj fine la Ministerio pri Internaj Aferoj aprobis la fondon de Hispana Asocio de Laboristaj Esperantistoj, la 22an de julio 1987.

La grupoj Ĝirona Espero kaj Amics de l'Esperanto el Olot (Ĝirona) eldonis informilon en kataluna lingvo sub la moto "La lingvo internacia faciligas la dialogojn inter la popoloj".

Krom la kutimaj elementaj, superaj, korespondaj, ktp. kursoj pri Esperanto, oni devas aparte mencii la kurson starigitan de Andaluza Esperanto-Unuiĝo pri "Esperanta-morfosintakso".

La prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, s-ro Salvador Aragay Galbany, prelegis diversfoje pri Esperanto, precipe en katalunaj lokoj. Ankaŭ la eks-prezidantino d-rino M^a Rafaela Urueña prelegis en Valladolid pri "El esperanto, vehículo de cultura internacional".

Menciindas la diversaj subtenoj atingitaj dum la jaro por difinitaj klopodoj: de hispana UNESKO-komisiono por la eldono de la verko "Sentempa Simfonio", tria libro en la serio Hispana Literaturo; la subvencio de ŝparkaso el Asturio por eldoni la verkon "Astura bukedo".

La 20an de februaro ĵurnalo "El Norte de Castilla", el Valladolid, publikigis ampleksan, tri kolumnan artikolon sub titolo "Cien años entendiéndose en Esperanto"; ĉi tiu artikolo, verkita de Juan Pando, distribuiĝis pere de gazet-agentejo EFE kaj aperis en pluraj aliaj ĵurnaloj. Dum la jaro la plej grava hispana ĵurnalo "El País" aperigis kelkajn artikolojn pri Esperanto, krom pluraj mencioj, ofte lige kun la tradukoj de Asteriks kaj Tiĉjo. Aliaj ĵurnaloj, kiel ezemple "El Diario Montañés", "Alerta", "La Voz de Galicia" kaj aliaj aperigis longajn raportojn pri esperantaj agadoj.

Eble la plej efika kampanjo por la diskonigo de Esperanto tra la tuta lando estis tiu iniciatita de bicikla karavano gvidata de franca s-ano Jorgos, kiu sukcesis aperigi favorajn artikolojn kaj raportojn pri la Internacia Lingvo en plej multaj el la vizititaj urboj.

La Urba Kultura Fonduso el Avilés (Asturio) decidis iniciati la peton de la premio "Princo de Asturio al Konkordo, 1988" por la Internacia Lingvo Esperanto. El tio rezultis grava efko en diversaj regionaj ĵurnaloj kaj radiostacioj.

Kvankam ne rekte ligita kun Esperanto, tamen menciindas ke la nova "Justiculo de Aragono" estas s-ro Emilio Gastón Sanz, esperantisto el tre konata kaj prestiĝa movada familio. Tiu ofico ekivalentas je tiu de "Popola defendanto".

Kelkaj lokaj radiostacioj elsendis regule programojn pri Esperanto, inter tiuj Radio Klara, el Valencio; Radio Navia (Asturio), ktp.

DEZIRAS KORESPONDI

S-ino ELZBIETA NARUK (28-j.), ul. Elblaska 22/12 80— 765 GDANSK. Pollando.— Gennadij Pikov Gennadjeviĉ, pri la hispana lando kaj reciproke pri la sia. 630126, USSR, u. Novosibirsk-126, str. Vibornaja 97, loĝ.

TURISMAJ BROŜUROJ

Hispanio. Turisma broŝuro. 28 paĝa. Bele ilustrita. Ministerio pri Turismo. 15.000 ekzempleroj.

Madrid kaj ĝia monumenta ĉirkaŭaĵo. 24 p. Ilust. NIPO: 277-87-009-5.

Valencio, bele Ilustr. broŝuro kun koloraj bildoj. 24 p. Valencia: Patronato Municipal de Turismo, 1987.

INFORMAJ BROŜUROJ

¡Atrévete con el esperanto! Hispana Esperantista Junulara Societo. Informilo pri Esperanto kaj varbilo por HEJS.

JUAN CARLOS RUIZ kaj GIAN CARLO FIGHIERA: Datos acerca del movimiento esperantista (1887–1987). Madrid, 1987, 20,8 x 14,8 cm. Hispanlingva informilo. 10 p. ISBN 84-398-9309-4. Colección: Documentos sobre el esperanto, nº 1, Sciigoj pri la internacia kaj enlanda movadoj.

M^a RAFAELA URUEÑA: Esperanto, el idioma para comunicarse sin obstáculos. Valladolid: Federación Española de Esperanto, 1987. 16 p. 29,7x21 cm. Escepte modernaspekta informa broŝuro kastililingva, kiu komencas per emfazo de la rajto je komunikado. 5.000 ekzempleroj.

Notas e informe sobre a lingua internacional Esperanto. Santiago de Compostela: Asociación Galega de Esperanto, aprilo 1987a. 74 p. 21x14 cm. Ilust. ISBN 84-398-9049-4. Subvenciita de Conselleria de Cultura e Bienestar Social de la Xunta de Galicia. Ampleksa informa kompilaĵo pri Esperanto en galega lingvo. 500 ekzempleroj.

¿Por qué el Esperanto en la escuela? El la franca trad. en la hispanan la Hispana Sekcio de I. L. E. I. Eldonita por la kampanjo "Esperanto en la Lernejo". Vigla propagandilo de Esperanto kun trafaj argumentoj tiel same lingvistikaj kiel sociaj.

DEZIRAS KORESPONDI

Ĝimaje en Moskvo ekfunkciis KOPSO – la unua instrua E-kooperativo en USSR. Kun la celo helpi reciprokajn leteramikojn de niaj disĉiploj ni kreis INTERSERVO – datumbazo pri korespondemuloj. Nun ĝi enhavas 500 adresojn el 10 landoj kaj ni atendas multajn pliajn. Adreso de "Interservo": p/a s-ino Larisa Biryukova, Uralskaya ul., 5-160, Moskvo SU-107241 Sovet-Unio. Adreso de kooperativo "Kopso": k.d. "Lenino", Birjulevskaja ul., 53-53-1, Moskvo, SU-115372 Sovet-Unio. — S-ro Lech Grochulski, 40 jara, edzigit. Komencanto, sed garantias respondon. 42-206 CZĘTOCHOWA ul. Zarecka 54/155. Pollando.

TRADUKITAJ VERKOJ

Astura bukedo, div. aŭtoroj. El la hispana trad. F. de Diego, J. Camacho, L. Dek. Gijón: Astura Esperanto-Asocio, 1987. 138 p. 18,1 x 11 cm. Ilust. ISBN 84-398-8908-9. Poemoj kaj rakontoj de kvin konataj asturaj verkistoj, de ĝis antaŭ pli ol unu jarcento.

Sentempa simfonio. Poem-antologio hispana, trad. Fernando de Diego. Madrid: Ediciones La Misma, 1987. 154 p. 18,1 x 11 cm. ISBN 84-86384-02-8. Subvenciita de hispana UNESKO-komisiono. Sepdeko da poemoj, celantaj prezenti ĝeneralan panoramon de la hispana poezio; kun mallongaj biografioj.

FEDERICO GARCIA LORCA (1899-1936): Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba. El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrid: Madrida Esperanto-Liceo kaj Ediciones La Misma, 1987, 229 p. 21,2 x 15,4 cm. Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 23. ISBN 84-86384-03-6. Du el la brilaj dramoj de la fama humanisma verkisto. GUILLERMO OSORIO: La blua hundo. Dulingva (esperanta-hispana) eldono. El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrid: Aguacantos, marto 1987. 25 p. 16,9 x 11,4 cm. ISBN 84-398-9017-5. Noveleto. MARJORIE BOULTON: Zamenhof, autor de l'esperanto. Barcelona: El Llamp, 1987. El Esperanto trad. Jordi Carbonell. 237 p. 21 x 15,5 cm. Biografio de la iniciatinto de la internacia lingvo en la kataluna.

ORIGINALAJ VERKOJ

ERNESTO TUDELA FLORES (1394-1974): Vocabulario Esperanto-Español. Zaragoza: Hispana Esperanto-Federacio, 1987. 176 p. 21 cm. Represo de unudirekta vortaro.

ANTONIO MARCO BOTELLA: Analoj de la esperanta movado en Hispanujo. 384 paĝojn. 21 x 15,5 cm. Unua volumo: 1887-1953. Zaragoza, 1987. Sferoj 5; Sciencfikcio kaj fantasto, komp. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: la kompilinto, 1987. 140 p. 18 cm. Ilust. ISBN 84-398-8777-9. Ok rakontoj sciencfikciaj, ĉiuj de verkistinoj. GIORDANO MOYA (1913): La homa vivaventuro. Barcelona: Barcelona Esperanto-Centro, 1987. 302 p. 20 x 13,4 cm. ISBN 84-398-8887-2. Meditoj pri la homa socio, aparte pri aspektoj etikaj kaj ekonomiaj, kaj la rolo en ĝi de la Esperanto-movado.

Pandemonio, div. aŭtoroj. Málaga: Pandemonio, 1987. 80 p. 21 cm. Dek ok originalaj rakontoj k.a. de ses junaj hispanaj aŭtoroj. Subvenciita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

TADEUSZ ROSTANSKI: Ho, mia kor'. 55 p. Gijón: Astura Esperanto-Asocio, decembro 1987. Tajpita kaj fotokopiita. Spektaklo pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof.

Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vol. 2: Esperantismo. Div. aŭtoroj. La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987. 790 p. 24,5 x 17 cm. Bind. ISBN 84-600-4292-8. Sesdeko da esperantologiaj eseoj pri plej diversaj temoj el la plumo de monde konataj aktivuloj sur tiu kampo.

DIVERSAJ

Afiŝo pri la Jubilea Nacia Kongreso. Madrid: Secretaría General de Turismo; Dirección General de Promoción del Turismo, 1987.

Katalogo de Esperantaj periodaĵoj en la privata Esperanta Biblioteko "Ramón Molera Pedrals", Moià (Hispanujo). Moià: 1987. 56 p. 29,7 x 21 cm. Komputila katalogo de interesa kolekto bone ordigita, kun entute pli ol 6500 jarkolektoj.

JOSE AÑO BELDA: Esperanto, aeiou de la internacia lingvo. Valencia: José Año Belda, 1987. 60 p. 30 cm. ISBN 84-398-8791-4. Depósito Legal V-398-1987. Rektmetoda lernolibro por infanoj.

FELIX NAVARRO CLEMENTE: Curso práctico elemental de Esperanto. Valencia: Grupo Esperanto de Valencia, 1987. Ilus. 128 p. Gramatika metodo kun vortaro.

Juan Azcuénaga
Ĉefdelegito de UEA

RECENZO

"CURSO PRACTICO elemental de ESPERANTO". Prof. Félix Navarro Clemente. Eldonejo: Grupo Esperanto de Valencia. Pĝ. 128. Formato 21'5 x15 cm. Prezo 600 pesetoj (Speciala rabato por Esperanto-Asocioj 33%)
Mendoj: Grupo Esperanto de Valencia. Gran Vía Fernando el Católico, 45-3º 46008 VALENCIA

Laŭ la titolo, jen praktika elementa kurso de Esperanto. Ĝi precipe estas instrumetodo por infanoj, junuloj kaj ordinaraj personoj ne studentaj, tamen kompleta lernolibro.

Niaj hispanaj lernolibroj de Esperanto aŭ estas nur skizaj aŭ se kompletaj nur adekvataj por universitataj. La lernolibro de Félix Navarro, kvankam elementa, havas multajn ekzercojn, klarigajn desegnojn, proverbojn kaj eĉ spritaĵojn. Aldone ĝi enhavas Grafikan Didaktikan Vortaron kun ilustritaj vortludoj kaj pliajn ekzercojn tre adekvatajn por memori vortojn kaj konstruadi frazojn. La aŭtoro de tiu vortaro estas Francisco Año. Krome estas apendicaj tekstoj de Fernando de Diego, Juan C. Ruiz, Gian Carlo Fighiera kaj Juan A. Giménez pri Esperanto kaj Esperantismo, kaj mallonga historio de la Esperanto-Movado en nia lando kaj aparte en la urbo Valencio.

Entute la verko estas moderna lernolibro por komencantoj, certe tute nova metodo aparta de ofta rutino.

G.M.E.

Estas multaj personoj, kiuj opinias, ke por internacia lingvo jam troviĝas la angla. Tiu pensomaniero estas la plej granda resigno kaj perfido al ĉiuj kulturoj kaj lingvoj, laŭ tio, ĉiu lingvo rajtas fariĝi internacia. Krome, ni ĉiuj scias, ke gramatike la angla neniel superas Esperanton. La ampleksa eĥo tutmonda, kiun ĝuas la angla lingvo estas fenomeno hegemonia, ekonomia kaj eĥ milita. Ĉiam kiam lando estis submetita, la venkinto postulis la lernon de sia lingvo. Vi povas tiurilate trastudi la historion kaj precipe la nomatajn koloniigojn, inkludante la hispanan epokon en Ameriko.

Nun, la angla lingvo, kun sia ekonomia povo, havas tiom grandan superregon, ke en la lernejoj de landoj ne angle parolantaj, ĝia lernado estas devigata ekde la unuaj lernejoj, kiel neceso. Sed pri la lernado de la angla en la praktiko, estas tute alie, kiam oni postulas ĝustan posedon de la lingvo. La plej granda parto de la lernantoj atingas nenian sukceson. Jes, ekzistas elito, devenanta precipe de la altaj socitavoloj, kiu fine kapablas angle paroli kontentige. La problemo estas, ke por atingi tiun kapablecon, la lernanto devas translokiĝi al Anglujo aŭ al lando, kies lingvo oficiala estas la angla, por adaptiĝi al plej ĝusta fonetika prononcado. Do, ni denove vidas la laboristojn apartigitaj, ĉar tiu efika lernosistemo nur estas por personoj riĉaj. Nur Esperanto metas la laboristojn samrange de tiuj privilegiuloj, kaj tiel konkuros kun sama ebleco por atingi de kvalifikaj laborpostenoj.

Esperanto, kiel lingvo-ponto inter la lingvoj, estas lojala alternativo por ĉiuj kulturoj kaj egala instrumento por riĉaj aŭ malriĉaj homoj.

Do, restas tre klare, ke en la nuna monda lingvosistemo la laboristoj, kiel en multaj aliaj aspektoj de la vivo restas marĝene kaj tre malavantaĝe kompare kun tiuj, kies ekonomio donas al ili eblecon por pli bona kulturiĝo.

Estas kompreneble, ke kontraŭ la amaso da problemoj precipe laboristaj hodiaŭ ekzistantaj en nia sociordo, paroli al laboristoj pri la bezono lerni Esperanton, estas prezenti nin, kiel verajn utopiulojn. Tamen sub mia koncepto de esperantistoj kaj laboristoj kaj surbaze de niaj principoj kulturaj, sociaj kaj solidaraj, ni devas alvoki la laboristan klason por ke ĝi interesiĝu pri Esperanto.

Povas ekzisti intelektuloj, kiuj apogas Esperanto-n kaj ĉion koncernan al ĝi. Tiu subteno, evidente estas ege valora por nia movado. Tamen se la laboristaro, la popolo ne interesiĝas pri Esperanto, nia lingvo neniam atingos sian celon. Vere la laboristoj, malgraŭ la problemoj, kiuj nin ĉirkaŭas devas

konsciĝi pri la graveco de la lingvo en la ĉiutaga vivo. Esperanto donas al la laboristoj la eblecon memstari antaŭ tiu problemo, kiu estas la lingvo en la homaj rilatoj.

Oni povus mencii la malagrablojn, kiujn okazigas la nescio de la lingvo, kiam oni laboras eksterlande. La nescio de la lingvo ege malfavoras la elmi-grinton. Ni ankaŭ povas mencii la senutilan laboradon kaj la senmezurajn elspezojn en la grandaj institucioj internaciaj. Elspezoj, kiuj grave efikas en la koncernaj buĝetoj, kaj kiuj Esperanto povus redukti je minimuma kvanto.

La laboristoj, konstruanto de ĉio, havas en siaj manoj ankaŭ la venkon de Esperanto. Sen la laboristaro Esperanto neniam atingos sian celon.

Luis Serrano Pérez

KURSO DE ESPERANTO PER KORESPONDADO DE KAE

Tiu ĉi 16-leciona kurso, kun riĉa ekzercaro plus dudirekta vortareto Esperanta-kastililingva, kostas entute 2.000 pesetojn (*). Aparte aĉetebla kasedo, kun modela Esperanta prononco en la klara voĉo de la kroatdevena aŭstralia esperantisto, s-ano Milan Sudec, kostas pliajn 500 pesetojn. Enskribiĝoj estos traktataj nur post la koncerna antaŭpago, kiun oni sendu, nepre per poŝtmandato, al **KURSO DE ESPERANTO PER KORESPONDADO DE KULTURA ASOCIO ESPERANTISTA (KAE)**, c/ Font Nova, 32. 08202-SABADELL (Barcelona)

(*) Paginte tiun monsumon, ĉiu kursan(in)o aŭtomate fariĝas membro de "Kultura Asocio Esperantista" por unu jaro, dum kiu oni rajtos ricevi la monatran informilon de Kae, periodaĵon tute redaktatan en simpla, laŭ-Fundamenta Esperanto, kiu legaĵo donos oportunan okazon rekte familiariĝi kun la lernata lingvo. Por la bono de nia Movado, oni petas al ĉiuj esperantistoj nialandaj, ke ili bonvole influu eventualajn gesimpatiantojn al Esperanto enskribi sin en tiun Korespondan Kurson. KAE estas aliĝinta al **HISPA-NA ESPERANTO-FEDERACIO**, kiu rekomendas tiun kurson.

DEZIRAS KORESPONDI

— KORESPONDEMULOJ... sendu vian anoncerton por senpaga enpresigo en "KORESPONDI". Por ricevi specimenon aŭ provekzempleron sendu 3 l.R.K. aŭ DEK fr. frankojn aŭ DU usonajn dolarojn al la eldonanto: R. MELO, 34, Avenue de Russie, F. 03700 BELLERIVE s/Allier. Francujo.—

LA PLAGO DE PARONIMOJ EN ESPERANTO

Bernard Golden

Sur la unua paĝo de *Heroldo de Esperanto* (n-ro 1, 1986) en la artikolo titolita "Aliaj Kongres-karavanoj", troviĝas frazo, kiun mi devis dufoje legi por kredi ĝin. En la kunteksto de informoj pri vojaĝkostoj por partoprenantoj en la UK en 1986 en Pekino, estas dirite, ke "la prezoj inkluzivas plenan pension en Ĉinio...". Nu, tio ja estas novaĵo, ĉar ĝis nun laŭ mia scio neniu kongreslando estas tiel malavara, ke ĝi ebligis emeritiĝon de esperantistoj okaze de ilia vizito al Esperanto-aranĝaĵo. Kiu ne kredas tiun parton de la enhavo de la artikolo, konsultu sian vortaron por ekscii la precizan signifon de "pensio". La vorto "pensio" ja ekzistas en Esperanto, sed ĝia uzo en la citita frazo estas tute erara! Estas simil-forma vorto en Esperanto, "pensiono", kies signifo konvenas en la koncerna kunteksto, ĉar ĝi rilatas al aranĝo en domo aŭ hotelo por pagi inkluzivan prezon por loĝado kaj manĝado. La du vortoj, "pensio" kaj "pensiono", konfuzas multajn esperantistojn, ĉar ili estas paronimoj. **Plena Ilustrita Vortaro (PIV)** difinas paronimon jene: "vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama". En la ekzempla frazo sekvanta la difinon, estas dirite, ke "en Esperanto paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsamaj. "Pensio" kaj "pensiono" ambaŭ enhavas la nocion de pago; fakte, ili devenas de la sama latina vorto, la verbo **pendere**, kiu signifas pagi.

Nun ni ekzameni alian paroniman paron, "rakedo/raketo". Komparu la sekvajn citaĵojn ĉerpitajn en la magazino **Monato**.

- a. "... sur la teritorio de Sovetunio staris jam 580 mezdistancaj raketoj." (3/1982)
- b. "Misilo... estas simila al eta rakedo." (3/1982)
- c. "...Sovetio ne lokos pli multajn SS-20-rakedojn en la eŭropa parto de sia lando." (5/1982)
- d. "**Korekto**. Stulta eraro troviĝas en n-ro 5/82 sur paĝo 6; en la unua notico kompreneble ne temas pri rakedoj por tenisludo, sed pri raketoj. Ni petas pardonon. red." (6-7/1982)
- e. "Ĉu vi emas ankaŭ lerni ĉine plumpilkudi?... Raketon vi ne bezonas." (3/1985)

Estas evidente, ke la vortuzado estas tute kaosa. En la sama numero de la periodaĵo, estas uzata jen "raketo" (a), jen "rakedo" (b). En citaĵo (d) la redakcio konfesas, ke la uzo de "rakedo" en (c) estas erara. Tamen, en (e) okazas ankoraŭ unu eraro, ĉar en tiu kunteksto la ĝusta vorto estas "rake-

do". La paronima paro "rakedo/raketo" diferencas disde aliaj paronimoj, ĉar la signifoj estas tre malsamaj, kiel indikas ankaŭ la etimologioj. "Raketo" venas de la franca **rocket/roquette**, kiu siavice estas spurebla al la itala vorto **rocchetta**, la diminutiva formo de **rocca**, signifanta ŝpinbastonon aŭ konuklon. La etimo de "rakedo" estas la franca substantivo **racquette**, kiu estas batileto. La "t" estis ŝanĝita al "d" por distingi ĝin de "raketo". La problemo por lernantoj kaj uzantoj de Esperanto estas memori la difinojn de la du vortoj por povi uzi ilin en konvenaj situacioj.

Ĝuste pro tiu bezono streĉi la cerbon, paronimoj kreas malfacilaĵojn. Be-daŭrinde, aŭtoroj de lernolibroj, kompilantoj de vortaroj kaj instruantoj de Esperanto ne sufiĉe ofte atentigas pri tiu ĉi speco de insidaj vortoj. Cetere, estas ankaŭ homoj, kiuj defendas paronimojn en Esperanto. Ekzemple, d-ro Ivo Lapenna asertas, ke la fakto, ke malbonaj sciantoj de Esperanto ne scias ĝuste uzi paronimajn parojn, ne povas pravigi forigon de paronimoj en Esperanto aŭ kontraŭstaron al enkonduko de novaj, se vere necesaj. (**Interencacia Jura Revuo**, 1985:2. pĝ. 31). Nun venas granda surprizo, eble ŝoko. En tiu sama numero de **Internacia Jura Revuo**, la organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, kies prezidanto estas Lapenna, troviĝas misuzo de paronimomj! Jen du ekzemploj.

1. D-ro L. Dubravszky marteladas la punkton, ke esperantistoj devas lerni la uzon de paronimoj en Esperanto same kiel oni faras, lernante etnolingvojn. Mi ĉerpis la sekvan frazon el la artikolo verkita de Dubravszky, kiu aperis en la menciita jura revuo.

"Miasperte tiu celo iĝas atingebla, se oni adaptas la vortojn, kiujn "Sugestoj..." entenas."

Laŭ la kunteksto, la ĝusta vorto estas "adopti", sed Dubravszky iom konfuziĝis pri la paronima paro "adapti/adopti".

2. Alia kolego de Lapenna, Ralph Harry, surpaperigis jenan frazon. "...sed fine ĉiu ŝtato akceptus la decidon de senpartia jura aŭ arbitra tribunalo."

Devas esti evidente al ĉiu, ke senpartia tribunalo ne povas esti arbitra tribunalo. Ankaŭ aliloke en la sama artikolo okazas misuzo de "arbitra" anstataŭ "arbitracia", la ĝusta vorto.

Se oni akceptus la vidpunkton de Lapenna, ke tiuj, kiuj ne scias uzi paronimojn, estas malbonaj sciantoj de Esperanto, oni devus enmeti en tiun kategorion amason da homoj, kiuj dum pluraj jaroj uzas Esperanton kaj opinias sin bonaj sciantoj de la lingvo. Se de tempo al tempo ili faras erarojn, kies kulpo estas tio? Ilia aŭ la malfacilaĵoj en la gramatiko kaj semantiko de Esperanto? Dum la centjara historio de Esperanto, ĉiu generacio ripetas la erarojn de siaj antaŭuloj. Tio signifas, ke la plago de paronimoj en Esperan-

to neniam formalaperos, krom se oni forigos tiujn leksikajn elementojn de la lingvo. Tio estas apenaŭ ebla rilate tiujn paronimojn, kiuj estas Fundamentaj aŭ oficialigitaj. Eble oni povas anstataŭigi kelkajn membrojn de paronimaj grupoj per novaj morfemoj. Tiun solvon alprenis Ido, kiel la sekvaj ekzemploj montras.

Esperanto

pesi

pezi

oferi

oferti

nevo

nepo

Ido

ponderar

pezar

sakrifikar

ofrar

nevo

nepoto

Mi opinias, ke per la ĉi-supraj citaĵoj mi montris, ke la starpunkto de Lapenna ne estas apogebla. Paronimoj sendiskriminacie stumbligas kaj bonajn kaj malbonajn sciantojn de Esperanto. Pro tio mi proponas, ke en la estonteco oni provu eviti la enkondukon de novaj paronimoj.

Noto

Pli da citaĵoj ilustrantaj la eraran uzon de paronimoj troviĝas en miaj antaŭe publikigitaj artikoloj pri la temo.

1. La problemo de paronimoj en Esperanto. **Paco**. 1978; 25 (3): 10-11.
2. Kion ricevas emerito — pensionon aŭ pension? **The Australian Esperantist**. 1979; 174 (254): 252-253.
3. Kio estas la diferenco inter "frunto" kaj "fronto"? **Hungara Fervojista Mondo**. 1979; 23 (4): 57.
4. Deserto en la dezerto. **Filologo**. 1981 aprilo; 18: 2-4. Ankaŭ en **Oomoto**. 1981 januaro-junio; 1-6: 55-58.
5. Kion signifas "frunto" kaj "fronto"? **Heroldo de Esperanto**. 1982, 20 novembro; 58 (14 (1705)): 3.
6. La historio de "debito" kaj "debeto" en Esperanto. **L'Esperanto**. 1984; 62 (4): 14-15.
7. "Domaĝi/damaĝi" — malfacila vortparo. **Esperanto Aktuell**. 1985; 4 (7): 9-11.

DEZIRAS KORESPONDI

Jilka Vaněčková, 16-jara gimnazia studentino. Čečelovice 27, 38734 Strakonice Ĉeĥoslovakio.— Lenka Větrovnová, 16-jara studentino, komencantino. Cuřénova 586, 14018 Praha 4-Libuš Ĉeĥoslovakio. Geografio, muziko, literaturo.— Zdeněh Chotaš, 16-jara gimnazia studento, Leninova 873, 38901 Vodňany Ĉeĥoslovakio.—

Memvideblas, ke foje la plurlingveco malhelpas la komunikadon. Tamen estas reale, ke ankaŭ foje iuj dulingvaj regionoj ĝuas pli altan lingvan kaj kleran nivelon ol aliaj unulingvaj. kie situu Esperanto?

Ne kontentigu vin per la simpla legado de ĉi tiu artikolo. Kritiktu ĝin kaj reagu.

x. — En Hispanio oni parolas, krom la kastilia, aliajn lingvojn, ekzemple, la vaskan, la katalunan, ktp. Rajte oni povas jesi, ke ĉiuj ili estas hispanaj.

— Kiel kutime, la hispanaj lingvoj havas dialektojn. Tute simple temas pri realaĵo normala okazanta en ĉiu lingvo ne planita.

— Ĉiuj hispanaj lingvoj, escepte de la vaska, devenas de la latina.

— Ŝajne la dulingvaj regionoj emas al Esperanto pli ol la unulingvaj.

— Esperanto enhavas multegajn kapvortojn similajn aŭ egalajn al tiuj de preskaŭ ĉiuj hispanaj lingvoj.

— En Hispanio, la plej uzata lingvo estas la kastilia.

— La alveno de la demokratio kunportis la ekfloradon de pluraj hispanaj lingvoj.

— Krom la kastilia, neniu alia hispana lingvo estis permesita oficiale en Hispanio dum la antaŭa reĝimo.

— Malgraŭ la simileco inter E-o kaj preskaŭ ĉiuj hispanaj lingvoj, la Internacia Lingvo ne evoluas kontentige en Hispanio.

xx. — Eĉ supraĵa esploro de la situacio montras, ke:

— La kono de E-o favoras la studon de aliaj lingvoj, kaj inverse.

— Impona kaj trudema propagando de la angla malhelpas senĉese la disvastigon de E-o.

— Ne estas interna opono inter E-o kaj la hispanaj lingvoj.

— Mankas seriozaj, politikaj, prilingvaj kaj sociologiaj studoj pri E-o verkitaj en la hispanaj lingvoj.

— Mankas studoj pritraktantaj la rilatojn inter E-o kaj ĉiu hispana lingvo.

— La plifortigo de E-o samkiel tiu de la lingvoj de la Aŭtonomaj Komunumoj dependas ĉefe ne de la subteno de la Nacia Registaro sed de tiu de la Aŭtonomaj Komunumoj.

xxx. — El ĉio ĉi tio oni rajtas indukti la jenajn principojn;

— Esperanto kaj la hispanaj lingvoj (escepte de la vaska) tre similas.

— Tre gravas la rolo de la Registaro de la Aŭtonomaj Komunumoj en la disvastigo de E-o.

- Necesas kalkuli kun la etnaj lingvoj.
- Tre utilas priatenti la sociajn cirkonstancojn de ĉiu Komunumo.
- xxxx. – Jen kelkaj agadproponoj plenumendaj:
 - Okazigo de seminarioj, prelegoj, kunvenoj pri lingvaj temoj rilate al E-o kaj la hispanaj lingvoj.
 - Enkonduki E-on kiel studindaĵon en prilingvaj rondojn.
 - Verki kaj aperigi artikolojn pri la lingvo Esperanto en revuoj kaj ĵurnaloj.
 - Kunlabori kun la radiostacioj per prilingvaj temoj montrante ĉiam pli-malpli rekte la taŭgecon kaj la bonecon de E-o.
 - Eldoni verkojn en la hispanaj lingvoj pritraktantaj lingvistikajn aspektojn de la Internacia Lingvo.
 - Varbi simpatiantojn inter la gejunuloj studentaj lingvojn en Universitatoj kaj Lingvolernejoj.
 - Uzi E-on sole aŭ kune kun la koncerna hispana lingvo okaze de komercaj, industriaj, ktp anoncoj.
 - Uzi E-on en telegramoj, leteroj kaj presaĵoj.
 - Enkonduki E-on en la Somerajn Universitatojn okaze de Kursoj pri lingvaj aŭ sociologiaj materioj.
 - Prizorgi ĉiam ne insisti pri la facila lernado de E-ro. Tio ne utilas hodiaŭ al ĝia disvastigo en Hispanio.

Andrés

DEZIRAS KORESPONDI – Timpu Iulian. Str. Nicolau Bălcescu, nr. 13 B, bl. 1, ap. 14. 6200 GALATI. R.S. România. — José René Fernández. "Unión de Escritores y Artistas de Cuba. Calle 17. nº 351 VEDADO, LA HABANA, Kubo. Por interŝanĝo de ideoj kaj spertoj pri Esperanto, la monda batalo por paco, literaturo, ktp. kaj deziras ricevi materialojn pri Esperanto. — Iraj Panahy. Lakan Shokri nº 26. 41456 RASHT. Irano. 19a jara irano kun hispana esperantist (in)o. Li estas lernanto en tria klaso de dua-grada lernejo. — F-ino Matgorzata Adaszkievicz. Ul. Swierczewskiego 38 D 11. 47-220 KEDZIERZYN-KOŹLE. Pollando. 21-jara instruistino pri ĉiuj temoj. — S-ro Shahram Hassanzade. nº 21, Asafi Bon Bast Ave., Takhti St., RASH CITY, P.C. 41737 Irano. Irana 19-jara lernanto, pri sportoj, skio, fiŝado, pop- kaj rok-muzikoj, bildkartoj, — S-ro Slawomir Szymala 25-jara. Kun geesperantistoj el Hispanio. Hobioj: turismo, fotografado kaj kolektas bildokartojn. P.O. Box 486. 42-217 CZESTOCHOWA 17 Pollando.

OLIMPIAJ LUDOJ

Estas dimanĉo, la tria de oktobro. La tuta mondo ĵus vidis la finan ceremonion de la Olimpiko en Seulo. Ĉu estas hazardo, ke ĉi tiu tago estas ankaŭ la tago de la Paco? Seulo festis la pacdeziron de la tuta mondo.

Certe ĉiuj esperantistoj sentis la similecon kiu ekzistas inter nia idealo kaj tiu belega demonstracio kie 160 nacioj gaje kaj fratece dancis kune, simbologante pacon kaj kunlaboron.

Malgraŭ la fakto ke konkursoj estas iaj bataloj kaj ke dum la antaŭa trejno la partoprenantoj pensas ĉefe pri venko kaj medaloj, la fina festo en Seulo klare montris la originalan celon de la Olimpikoj: kunfratiĝon. Kion el ni imagis nian verdan flagon inter naciaj flagoj?

Jes, tio estus bona, ĉar TV montris, ke ekzistis ankaŭ lingvaj malfacilaĵoj en tiu internacia amaskunveno.

Dum la kongreso en Aŭgsburgo s-ro Seymoens proponis ke la esperantistoj en la tuta mondo agu en la sama kadro samtempe. Kompreneble, li aludis tiujn kadrojn, kiuj bezonas internacian komunikadon.

Tial mi volas proponi, ke nia nuna kadro estu la Olimpiko en Barcelono en la jaro 1992.

Se en ĉiuj landoj la esperantistoj serĉos la partoprenontojn de tiu Olimpiko kaj instruos Esperanton al ili (en Hispanujo ankaŭ al la organizantoj), tiam la Hispana Olimpiko povos doni pli grandan signifon al la jaro 1992, ĉar tiu jaro estos la jaro de la Eŭropa Unuiĝo. Inter la landoj de la Eŭropa Ekonomia Unuiĝo forfalos la ekonomiaj limoj kaj inter ili ne plu necesos pasportoj.

Ke la unua kaj la lasta tagoj de la Barcelona Olimpiko estu ankoraŭ pli profunde ĝojigaj per pli klara interkompreniĝo kaj intermiksiĝo de atletoj parolantaj Esperanton.

May Bijleveld

DEZIRAS KORESPONDI

Petr Minář, pedagogo. P.O. Box 41, 54401 Dvur Kralove n.1. Ĉeĥoslovakio. Historio, geografio, interŝanĝi bildkartojn k prospektojn.— Marie Grimová, 16-jara. Strato Spojenců 18. Opava. 74601 Ĉeĥoslovakio.— Markéta Čermaková. ul. Údernická 668/18, 56601 Uysoké Mýto Ĉeĥoslovakio Bildkartoj, prospektoj pri E-o.— Zbyněk Sejnoha. Domov Mládeže, Nedurova 557, 56943 Jevíčko Ĉeĥoslovakio. Muziko, naturo, libroj.— Jaroslav Jána. CS-53944 Proseč u Skutče 165 Ĉeĥoslovakio, Historio, politiko, filozofio, ciklismo, aŭskulti radion.—

OMAGO AL ESPERANTISTO

Alipio García León, okdekjara, Esperantisto ekde la civila milito, ricevis kortuŝan omaĝon en sia naskiĝurbo, Hoyo de Pinares (Avila), kie li laboris kiel helpisto de doktoro kaj akuŝisto dum 45 jaroj.

La urbestro dediĉis straton de la vilaĝo al nia samideano, kaj klarigis la meritojn realigitajn de li. Inter aliaj, li naskigis pli ol 2000 infanojn (la nuna loĝantaro estas 3000 personoj). Krome, li estis kunordiganto de la lukto kontraŭ paludismo en 1943 kaj de la tifoida febro en 1951. Aparte, li kunlaboris plurajn jarojn en la gazeto "El Diario de Avila", ĉefe pritraktante etnologiajn aspektojn de la vilaĝoj de la Avila montoj.

Lastatempe, en la pasinta somero, li kunfondis kulturen gazeton de loka diskonigo sub la titolo "KILOMETRO CERO", en kies unua numero, en tua paĝo verkis artikolon titolitan "ESPERANTO".

Lia nobla, entuziasma, kuraĝiga kaj senlaca spirito, meritas nian sinceran gratulon al amiko ALIPIO.

Danko de

Ivan Carlos Ruiz

NOVAĴOJ

Okaze de la 75-jariĝo de prof. d-ro Juan Régulo Pérez en marto 1989, la brazila eldonisto Gersi Alfredo Bays decidis eldoni la kolekton de la Esperantaj artikoloj de Régulo sub la titolo RIKOLTO — projekto iam antaŭvita en la Stafeto-serioj.

Editoroj de la ampleksa volumo estas Reto Rosetti kaj Reinhard Hauptenthal. Enkondukon verkos prof. Gaston Waringhien. Ĉar bibliografiaj antaŭlaboroj ne ekzistas (la Bibliografio en Serta I estas tre nekompleta pri Esperanto) necesas traserĉi multajn librojn kaj revuojn. Por faciligi tiun laboron kaj eviti mankojn, la teknika redaktoro (R. Hauptenthal, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt) petas pri atentigoj al artikoloj de Régulo.

MURCIA

La studentoj de la Politeknika Instituto de Murcio redaktas la revuon "PASEN Y VEAN" en kiu aperis artikolo pri Esperanto. Ni tre dankas al la Direkcio de la Politeknika Instituto ĝian intereson por Esperanto.

PENSOJ DE ZAMENHOF

EL "ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE LINGVO INTERNACIA"

(Fundamenta Krestomatio, 17a eldono, pĝ. 258)

Ĉu lingvo internacia estas bezona? Tiu ĉi demando per sia naiveco elvokos ridon ĉe la estontaj generacioj, tiel same kiel niaj samtempuloj ekridus ekzemple ĉe la demando "Ĉu poŝto estas bezona?" La plimulto de la inteligenta mondo jam nun trovos tiun ĉi demandon tute superflua; tamen pro konsekvenco ni metas tiun ĉi demandon dank'al tio, ke ekzistas ankoraŭ multe da homoj, kiuj respondas je tiu ĉi demando per "ne". La sola motivo, kiun kelkaj el tiuj ĉi homoj elmetas, estas sekvanta: "lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn kaj la naciojn". Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo. Sed ni supozu, ke tio ĉi efektive estus io terura, kaj ni rapidos trankviligi tiujn ĉi sinjorojn. Lingvo internacia deziras nur doni al la homoj de malsamaj popoloj, kiuj staras unu antaŭ alia kiel mutuloj, la eblon komprenadi unu alian, sed ĝi neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj. Timi, ke lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn, estas tiel same ridinde, kiel ekzemple timi, ke la poŝto, kiu donas al homoj malproksimaj unu de alia la eblon komunikiĝadi, minacas neniigi la buŝajn interparoladojn inter la homoj! "Lingvo internacia" kaj "lingvo tutmonda" estas du tute malsamaj objektoj, kiujn miksi inter si oni neniel devas. Se ni supozus, ke fariĝos iam kunfluigo de la homoj en unu ĉiuhoman popolon, en kiu ĉi "malfeliĉo" (kiel nomos ĝin la naciaj ŝovinistoj) estos kulpa ne la lingvo internacia, sed la aliiĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj. Tiam efektive la lingvo internacia faciligos al la homoj la atingon de tio, kio antaŭe estos principe decidita de ili kiel dezirinda; sed se la celado al kunfluigo ne naskiĝos ĉe la homoj memstare, la lingvo internacia per si mem certe ne volos altrudi al la homoj tian unuiĝon.

HEJS – Kunveno en Bilbao



La nuna HEF-estraro prezidata de Salvador Aragay venis al konsento kun la nova HEF-estraro prezidota de Antonio Alonso, ke la nova HEF-estraro havas inter siaj prioritataj taskoj:

**ALVOKI NIAJN JUNAJN FORTOJN AL HARMONIA KUNLABORADO
KAJ KIEL EBLE PLEJ GRANDA PENADO SUR SIN DE LA GVIDAJ
LABOROJ POR ESPERANTO EN LA TUJ SEKVAJ JAROJ.**

ĈEESTIS LA KUNVENON

Prezidanto de HEF. Salvador Aragay


Kandidato por la prezidanteco de la nova HEF-estraro A. Alonso

Prezidanto de H.E.J.S. Jordi Ferré

S-roj: Alberto Franco, José Manuel Conde, Alvaro Mellado kaj Juan Fontecha.

Bilbao, 20an de julio 1989

ZAMENHOF-MONUMENTO
EN SABADELL



Sabadell inaŭguros la 17an de decembro la plej imponan
monumenton al L.L. Zamenhof.

La esperantistaro de Sabadell atendas vian ĉeston.

**CAMILO JOSE CELA NOBEL PREMIITO
PRI LA LITERATURO 1989**

**Leginda en Esperanto la verko "La familio de Pascual Duarte",
eldonita de Barcelona Esperanto – Centro, Prezo 750 p-toj**

Ĝus aperis eldonita de Barcelona Esperanto-Centro la lasta verko de Giordano Moya, **Esperanto en Prospektivo** formato 13 x 20 cm. Paĝoj 160
Prezo 950 p-toj.

Jen gravega temo pri nia movado:

PROSPEKTIVO laŭ P.I.V. estas: "Scienco pri la kaŭzoj sciencaj, ekonomikaj kaj sociaj, kiuj akcelas la evoluon de la mondo, kaj pri la eventualaj situacioj, kiujn ili povas estiĝi".

Sub tiu moto, la aŭtoro Giordano Moya Escayola, verkinto de la "Homa Vivaventuro", analizas la penson de L.L. Zamenhof kaj ties idearon en rilato al la esperantista movado kaj konceptas ĝin kiel la portanton de ideo-for-to kapabla ŝanĝi nian aktualan civilizacion.

En la kriza nuntempo de la atom-energio, en kiu la socialaj ideologioj, plejparte hereditaj de la pasinta deknaŭa jarcento, jam atingis siajn kapablajn eblaĵojn, en mensa kaoso pro la disfalo de la kutima moralo, la aŭtoro montras, kiel la spirito entenata en la "interna ideo" de Esperanto povas generi novan homaran civilizacion, en unueco, paco kaj libereco.